

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 73 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 julio 1926

THE AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION.

The secretary of the Victorian Section of the A.E.A. reports that lately he has enrolled several isolated Esperantists as members of the A.E.A. To push forward the Esperanto movement in Australia it is necessary that we organise. This can only be done successfully if we unite in our efforts. There are hundreds of Esperantists scattered around Australia, who because of their residence away from the big centres of population are not members of any Esperanto group. Our wish is to enroll all these Esperantists in an endeavour by the small fee charged for membership to establish a fund to propagate Esperanto.

We have made a good start, will you help the movement along. The fee for full membership is 10/- yearly, full members receive the Suda Kruco, the official organ of A.E.A. Associate members 5/- yearly. All Esperantists who are not already members of a group affiliated to the A.E.A. are earnestly asked to become either a full or associate member. Will you help others to gain a knowledge of Esperanto?

LA B.E.A. DIPLOMO.

Gajnis la diplomon, C. J. Adcock,
Te Uhu, Auckland, Nov-Zelando;
Teresa Rawlinson, Melbourne, Victoria;
Koraj gratuloj (Red).

ESPERANTO DEBATED.

On the 27th May last, a public debate took place at Mangahao-Hydro, N.Z., on the subject of whether an international language is desirable. Messrs. McGuigan Brothers debated in the affirmative, and Messrs. Sanson, (Y.M.C.A. Organiser) and Boyce (the local schoolmaster) in the negative. Regrettably, a misinterpretation was placed on the title of the debate, and as a result, the speakers opposing the question were somewhat handicapped. As a result of the enormous amount of matter, which was of a highly informative and educative character, dealt with by the defenders of the international language, the debate proved to be a valuable means of pushing forward the Esperanto movement in this particular locality. At the present time the chances of forming a strong club appear to be particularly bright.

The debate was commenced by Mr. J. McGuigan, who vigorously stressed the economical advantages accruing from an international language, bringing out many splendid points to support his statements. The speaker contended that as the volume of international intercourse is great and increasing, that it is uneconomical to carry on in many different national languages of varying degrees of difficulty and all relatively hard of acquisition for those who do not know them as a mother tongue; also that it is economically sounder to carry on

international intercourse in one easy language than in a number of hard ones. The world is suffering a distinct loss in that there is a whole realm of scientific and learned literature—work of which the accessibility of all concerned is of the first importance, but which is often hindered because a translation into one language does not pay, or if made, reaches a limited public. Such powers of freedom cannot be reckoned in money; but modern economics recognise the personal and social factor, and any obstacle is certainly a public loss. "Business," meaning commerce, by being carried on in several national languages is suffering a loss. From a economical point of view, a considerable amount of time, effort, and money must be unproductively invested in overcoming the "language difficulty." In money alone the amount must run into thousands of pounds yearly. The time is also to be taken into consideration. Besides this, the extension of goodwill, swift progress, and wider knowledge, represents another side of the value of an international language. Big industrial concerns scrap machinery while it is yet perfectly capable of running and turning out good work, in order to replace it by newer machinery capable of turning out more work in the same time. Time is money. Can the busy world afford a language difficulty? Should the world in a businesslike spirit face the problem of wiping out the wastage of words by adopting the international language? Among other points raised were the benefits received by all classes of people of the world: assistance rendered to children at school, and to scientists in their researches; facilities afforded commerce; increased activities of radio and telegraphy; and how the international language unites the workers of the world and assists them in their struggles.

Mr. Sanson based his argument on the inevitable and immense loss of historical treasures and gems of literature, that would result to the respective nations if an international language were adopted and national languages abolished. The twenty minutes at his disposal were used to enlarge this point.

Mr. W. McGuigan, following, pointed out that it was an impossibility to abolish or disturb national lan-

guages; and such was not the intention of advocates of an international language, who aimed at providing an international neutral auxiliary language for the world. The adoption of a national language as an international one was impracticable owing to the great national prejudice and a consequent boycott of any language so suggested. National languages of the world had proved themselves to be inadequate as a medium for conducting the world's business, whether of a social, commercial, educative or diplomatic nature. It was pointed out that congresses in which national languages were used had never been successful and that the business had been transacted more or less in the dark, whereas international congresses carried on by means of the international language had proved themselves a tremendous success. The speaker concluded by remarking that the language barrier caused by the diversity of tongues had towered like mighty walls between the peoples and now with the advent of an international, neutral, auxiliary language it was only a matter of time when the people of the world would come together in mutual understanding.

Mr. Boyce was the concluding debater. He came provided with voluminous notes, but whether the unanswerable argument advanced by the affirmative speakers had proved these to be illogical, or whether the time at his disposal was insufficient, this speaker in the main, confined his remarks to endorsing the points raised by his collaborator, the only new aspect shown being a brief comparison of the international language with the various national languages.

Owing to the misinterpretation of the title, a decision was not announced; but it was unanimously agreed, in which the negative speakers joined, that the case for the international language had been absolutely proved, and that such a language was one of the greatest and undoubted assets of the world.

ANONCOJ.

S-ro Masa Mizutani, Rjokujiu Sa, P.O. Kesto 14, Kamata, Tokio-fu Japanujo; deziras korespondi, I.P., P.M.

CLASSES held every Monday, 7.30 p.m., at 5 Aldred Road, Auckland, N.Z. All welcome. Visiting Esperantists ring 25-828.

RECENZEJO.

DATOJ KAJ FAKTOJ pri la paca movado. Anna T. Nilsson, havebla de la verkistino, Malmo, Svedujo, prezo 1 sv.-da krono.

Tiu-ĉi volumo de kvin dek paĝoj, vere nur broŝuro, estas kompleta konsultlibreto rilate al la paclaboro, kaj estas bonvena, ĉar estas rimarkinde ke la historio de la paca movado estas vere malfacile alirebla. Multaj personoj kunlaboris en la pretigo de la libro kaj la rezultato estas verko, kies stilo kaj enhavo kontentigos la Esperantistaron. Flanke mi volas diri, ke la eventuala profito estos dividata inter la paca kaj Esperanta movadoj. (C.W.B.)

ĈIES INTERNACIA ESPERANTA STENOGRAFIO. Aĉetebla ĉe la aŭtoro, S. Dyba, gimnazia profesoro, 4, Moltkestr., Berlin-Niederschönhausen, 12 ekz. 10 fr. sv.

La aŭtoro reklamas, ke per sia sistemo korespondada skribo estas lernebla dum unu horo. La sistemo estas bone prezentita en korekta Esperanto; sed nur la praktikado montras ĉu ĝi estos egale taŭga, aŭ pli taŭga, ol la jam konataj sistemoj.—(C.W.B.)

IMPORTANT STEP BY THE BULGARIAN POSTAL AUTHORITIES IN FAVOUR OF ESPERANTO.

Following the decision of the last congress of the Universal Telegrafic Union in Paris, adopting Esperanto as a "clear language," which comes into force on 1 November 1926, the Ministry of Posts, Telegraphs and Telephones of Bulgaria, by special decree of 19th March (No. 83076) declared Esperanto a clear language as from the date of the said decree for the purposes of the postal territory of Bulgaria.

By official order (No. 83800) of 5th April 1926 the Directorate of Posts, Telegrams and Telephones notified its administrative organs of the said decree and specially recommended the study of Esperanto to the members of its staff.

In order to enable post office servants to acquire an elementary knowledge of Esperanto, the Directorate further ordered the affixing of an explanatory table of the grammar of Esperanto in the Bulgarian language, with numerous practical examples, in 500 post offices.—I.E.S.

PRI KOBALJOJ.

Ekzistas nur tri edukejoj de kobaloj kaj unu el ili estas en Aŭstralio, unu ĉe Hago kaj la alia en Usono. La posedanto de la Aŭstralio edukejo estas s-ro Cyril J. Miller, strato Bay, Brighton, elp. (Brajton), antaŭurbo de Melburno.

Ĉi tiu kobala edukejo estas mirinda loko. Ĉi enhavas, en la nuna tempo, sep milojn de tiuj komikaj bestetoj kaj pli ol cent kuniklojn. Por loĝejo ili havas apartamentojn en barako. Oni zorgas ilin tre atente. Ili havas glatajn peltojn, brilajn okulojn kaj ili estas ŝajne tute sanaj kaj estas tre energiaj. La mortado inter ili estas meznombro po tri kobaloj en semajno, kaj tiuj ĉi mortis pro maljuneco.

Oni demandas, kion homo faras kun tiom da kobaloj? La respondo estas — la afero estas profitodona. Ĉiuj kobaloj kaj kunikloj, kiujn s-ro Miller bredas estas destinitaj por esploraj studoj en la universitatoj. Tiucele, ili devas esti tute sanaj kaj jen la kialo de la grandaj zorgoj, kiujn oni devas fari pri ili.

Antaŭ kvin jaroj, kiam s-ro Miller starigis sian edukejon, la universitatoj kaj laboratorioj de Aŭstralio nur malfacile povis havigi al si regulan provizon da kobaloj. Tiuj, kiujn ili povis aĉeti, estis plejparte la dorlotatoj de infanoj, kaj estis liverataj de agentoj, sed sufiĉa nombro neniam estis havebla. S-ro Miller, kiam li studadis medicinon, ĉe la Universitato, sciis tiun malfacilaĵon kaj, kiam grava akcidento devigis lin cesigi siajn medicinajn studojn kaj preni sur sin ian okupon en la plena aero, liaj pensoj sin direktis al kobaloj.

Li aĉetis kobalojn ĉie, kie ajn li povis trovi ilin. En nelonga tempo la plimulto el la kobaloj en Viktorio sin trovis lokigitaj en lia edukejo, kaj la scienculoj de Aŭstralio gratulis sin pro tio, ke seninterrompa provizo de la malgrandaj bestoj estas je ilia dispono. Hodiaŭ la kobaloj de s-ro Miller estas forsenditaj en ĉiujn regionojn de Aŭstralio.

Ĉi tiu juna Viktoriano komence nenion sciis pri kobaloj aŭ pri iliaj bezonoj. Li sensukcese penis trovi konsilojn el libroj. Tial li vidis ke li devos akiri la necesan scion laŭsperte. Li eksperimentis per nutraĵoj kaj flegado, ĝis li progresis al difinita metodo. Nun li devas antaŭ aĉeti la medikagon, eĉ kvin jarojn en eston-

teco, por certigi ke li havos la necesan provizon. Rilate akvon — nu s-ro Miller ne donas ĝin al ili. Li trovis ke la trinkado malutilis al ili. La medikago kiun ili mangas estas trempita en akvo kaj tio estas la sola fluidaĵo kiun ili ricevas. Pri tio la kobajoj ne sin ĝenas. Ili estas glataj kaj grasaj kaj senmakule puraj. Poste, kiam li alvenis al preciza kaj sukcesplena metodo, s-ro Miller akiris libron traktantan pri edukado de kobajoj. Tie li trovis lia propra sistemo estas tute neĝusta. Sed li ne forlasis ĝin. Li daŭrigis sian metodon, ĉar li jam pruvis ĝian efikecon. Dum la pasintaj dekdu monatoj la kobajo edukejo en strato Bay ricevis pli da publikigado ol estas justa. Iuj personoj protestis kontraŭ ĝi kaj la loka municipia konsilantaro ricevis peton, ke ili forigu la pretekstitan malagrabajejon. S-ro Miller tuj malfermis la edukejon al la publika vido. La saninspektoro vizitis ĝin kaj certigis ke ĝi estis sen odoro kaj neordinare pura. Oni ankoraŭ protestis. La Brightona saninspektoro faris cent kvindek unu vizitojn al la edukejo dum la pasinta dekdu monatoj, iujn el ili ĉe meznokto, kaj ne eĉ unufoje li povis flari ian malbonodoron.

La postulado por kobajoj estas preskaŭ po sescent por semajno. S-ro Miller ellitiĝas ĉiun matenon je la kvina horo por flegi siajn bestetojn.

EUROPEAN ESPERANTO CONFERENCE IN LOCARNO.

A European conference of presidents of the Esperanto societies was held in Locarno at Easter under the auspices of the International Central Committee of the Esperanto-Movement. The conference was opened by the mayor of Locarno, Dr. Rusca, in the salon where a more famous Locarno Conference had met. Speeches were made by delegates of ten nations. The principal resolutions relate to the steps to be undertaken for the introduction of Esperanto into commercial schools and the courses broadcast by 30 wireless stations in 15 European countries, and also the publication of scientific works in Esperanto. The committee has received offers from three great publishing houses in Europe and Japan, which have recently commenced to publish works of this kind.—I.E.S.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY.

The annual meeting of the Melbourne Esperanto Society was held at their rooms, 5th floor, 323 Bourke Street, Melbourne, on Friday, the 25th of June. There was a good attendance of members. The secretary read a report of the activities during the year which among other items of interest included the fact that two examinations for Preliminary Certificate and the Diploma have been held with most successful results, most of the candidates passing with distinction. The treasurer reported favourable balances, both for the society and the library accounts. The following officers were reappointed:—Mr. C. W. Ballard, President; Mr. Robert, and J. Scurrie, Vice-Presidents; Miss V. Cox, Secretary; Mr. E. J. Cox, Treasurer; Mr. H. Byatt, Librarian; Mr. Robert, Assistant Librarian.

DESEGNISTOJ DE LA TUTMONDO ATENDU!

La Aŭstralazia Registaro intencas eldoni rememorigan poŝtmarkon, je la okazo de la unua kunsido de la Aŭstralazia Registaro ĉe la nova sidejo, Canberra, kaj invitas desegnistojn el la tuta mondo partopreni en la konkurso. La elekto de la desegno oni lasos al la imago de la desegnisto, sed la prefarotaj estos tipe Aŭstralaziaj! La desegnisto de la akceptitaj desegnoj ricevos altvalorajn premiojn.

Pliajn detalojn oni povas ricevi responde al letero adresita al sinjoro Gibson, Postmaster-General, G.P.O. Melbourne, aŭ de la Melbourne Esperanto-Societo, Box 731f, G.P.O., Melbourne, Victoria, Australia.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 1; Amikeco, 5; British Esperantist, 253; Bulgara Esperantisto, 8; Belga Esperantisto, 4; Bulteno Antverpena, 4; Die Einheitsfront, 14 ĝis 17; Esperanto (Rumanuja, 308; Heroldo de Esperanto, 27 ĝis 30; Internacia Esperanto-Servo, 3, 4; International Language, 3; Kataluna Esperantisto, 21, 22; La Verda Lumo, a; La Nova Tago, 1; La Suna Hispana, 107; Novaj Tempoj, 1 ĝis 4; Oomoto, 16; Oomoto Internacia, 5; Pola Esperantisto, 4; Svenska Esperanto, 4.

AL LA PRAKTIKEMAJ HOMOJ!

(Ernest Archdeacon).

Mi ĉiam pli kaj pli miras, kiam mi vidas la blindecon de la multego, kaj tiun de la aviadistoj, ne tuj ekkomprenintaj la multnombregajn kaj ŝatindegajn servojn; kiujn helpa lingvo ĉie adoptita kaj komprenita, nepre farus al ili. Tiom pli ke nun oni tre ofte trairas, en du horoj, la distancon inter la ĉefurboj de du malsamlingvaj landoj.

Tiuj servoj estos kompreneble multe pli grandaj estontece, sed ni posedas multajn pruvojn, ke oni jam povas ricevi kelkajn eĉ nun kaj eĉ jam de longe.

Ekzemple la usona aerostatisto Mix, en 1909, mankis de tre malmulte ne gajni la konkurson Gordon Bennett, pro sia nescio de Esperanto! (polaj vilaĝanoj ekkaptis la trenkablajn kaj la aerostatistoj ne estis sukcesantaj decidi ilin forlasi la balonon, kvankam unu el la vilaĝanoj parolis esperante). Same la franca aerostatisto Dubonnet, en 1912 alteriĝinte en Rusujo, kaj bezonante helpon por faldi sian balonon, tre malbone sin komprenigis de la vilaĝanoj, kvankam unu el tiuj-ĉi vane provis interparoli esperante kun li.

Mi esperas ke tiuj ekzemploj decidigos la praktikemajn aerajn navigantojn lerni Esperanton, Estontece ĝi potence utilos al ili sed de nun ĝi povas helpi ilin en malfacilaj okazoj, ĉar de dek jaroj ĝi grandege disvastiĝadis.

LA AUCKLAND N. Z. ESPERANTA ASOCIO.

Esperantistoj ĉe Auckland dum 12 majo reformis la malnovan societon kun la supre citita nomo. La jenaj oficistoj estis elektitaj:—prezidanto, s-ro J. S. Russell; vicprezidanto, s-ino A. E. Dewing; sekretario kaj kasisto, s-ro R. J. Crago; komitatanoj s-ro E. B. M. Dewing, s-ro C. H. Parker, s-ino E. M. Watkin, f-ino I. James.

La Asocio kunvenas la unuan kaj trian jaŭdon de ĉiumonato en la "New Church Hall" Newton Road, Symonds strato, Auckland, je la duono post la sepa vespere. La jara kotizo estas du ŝilingoj kaj ses pencoj. La celo de la Asocio estas disvastigi Esperanton, kiel eble plej multe, kaj jam sukcesis interesigi kvar ĵurnalojn, nome:—N.Z. Pictorial News, akceptos artikolon de R. J. Crago, ĉiusemajno; Young Citizen, akceptos artikolon por ĉiu eldono de E. B. M. Dewing; Eden Gazette, akceptos artikolojn verkotaj de diversaj kunhelpantoj, redaktata de f-ino Knight; Labour News, akceptos artikolon de s-ro C. N. Parker. Per la helpo de la kvar ĵurnaloj sendube la afero progresos. Pli ol dudek anoj aniĝis. La Asocio aranĝis ke dum la unuaj kvardek minutoj de la kunveno oni uzos la anglan lingvon por ke ĉiu komprenu la protokolon, Asociaj aferoj kaj aranĝoj, ankaŭ por instrui la komencantojn; la cetero de la vespero oni uzos nur Esperanto, por la kantoj, diskutoj pri propagandaj aferoj k.t.p.

SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS.

HOBART — EASTER, 1927.

Venu al Tasmanio, la Ĝardena ŝtato, por via libertempo.

Belegaj vidaĵoj! Reviviganta klimato!

Esperantistoj speciale bonvenotaj.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriptan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posta. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—Dum la pasintaj semajnoj la sekvantaj programeroj okazis ĉe la Melburna Esperanto Societo. — S-ro Hudson paroladis pri la lasta parto de sia mondvojaĝo; pri sia veturo sur la Panama kanalo, la veturo per vagonaro laŭ longe de la okcidenta marbordo de Usono, kaj vizito al la belaj insuloj en la Pacifika oceano, ĝis la reveno en Aŭstralio. Ĉi parolado estis la fino de treege interesa rakonto. Je junio la "Senpreparaj paroladoj" donis bonan okazon al la anoj ekzercadi sin en la lingvo. — La debato "Ĉu estas deĉe ke la virinoj fariĝus policaĵ juĝistinoj?" estis granda sukceso, kaj preskaŭ ĉiuj partoprenis. La anoj montris grandan intereson pri ĉi tiu debato, kaj la partio kiu gajnis, sukcesis per nur unu voĉdono. — S-ro Scurrie donis tre interesan paroladon pri "Grimpado sur la Skotaj Montoj," kiun li daŭrigos post kelke de semajnoj.

A euchre party will be held at the club rooms on the 30th July. Prizes will be awarded. Entrance fee 1/-. Proceeds for the Suda Kruco Fund. Come and bring your friends.

MANGAHAO-HYDRO, Nov.Zelando.—Dum pasinta monato McGuigan Fratoj penadis starigi novan klason en tiu ĉi urbeto. Sukcesplena debato helpis la aferon tre multe, publika opinio estis favore influita, kun la rezulto ke je la oka de junio la klaso konsistante el dudek anoj komencis studi sub la gvidado de la fratoj. Estonte kunvenoj okazos ĉiun duan mardon kaj ĵaŭdon.

WELLINGTON, N.Z.—Responde al peto de la administranto de la loka radio stacio 2YK sinjoro W. H. King brodkastis dum deka de junio, dek kvin minutan paroladon titolitan "La Radio Lingvo." Dua parolado sekvis post du semajnoj. La administranto de la stacio estas avida komenci Esperantajn lecionojn per radio, kaj se tio estos la deziro de sufiĉe da radianoj, regulaj lecionoj sekvos.

SYDNEY.—Unua perradia kurso esperanta en Aŭstralio komenciĝos ĉe radio-stacio 2KY la 3an Aŭgusto kaj daŭrigos ĉiun mardon vespere ĝis kompletigo.

El Rabaul, Nova Gvineo, radiogramo estis ricevita avizante, ke s-ro Maurice Hyde, aŭtoro de lernolibro "The Esperanto Guide," forlasis Rabaul la 29 junio, akompanata de lerta

miksrasulo esperantista, por partopreni la Edinburgh mondkongreson.

"Rotary Club of Sydney" invites s-ro F. T. Simon paroladi al la membrojn pri Esperanto je la 22 junio. Ĉirkaŭ 150 eminentaj komercistoj ĉeestis en "Hotel Australia" kaj multe impresiĝis pri la simileco de Rotario kaj Esperantismo.

Travojaĝarta samideano dum la monato estis s-ro J. A. Meagher, el Dublin, Irlando.

Gazetartikoloj aperis en "Sydney Morning Herald," "Daily Telegraph," "Labor Daily," "Sunday News" kaj "Radio."

Loka reprezentanto de "Lingua-phone Instituto" prezentos al la "Modern Language Association" je la 19 julio serio da gramofondiskoj, enhavante ankaŭ Esperantlingvaj.

S-ro D. Calnan parolis pri "La valoro de Esperanto al Laborista Movado" ĉe laborista grupo en Summer Hill.

WIRELESS LESSONS FROM SYDNEY ON TUESDAYS.

As intimated in our "Kroniko" last month, the Sydney Esperanto Society has now succeeded in making final arrangements with the Trades Hall Broadcasting Station to broadcast a comprehensive course of lessons in Esperanto. The Society's new president, Mr. F. T. Simon, has been selected as instructor.

Commencing on August 3rd with a lecture entitled "Why Esperanto?" a lesson will subsequently be given every Tuesday evening. Time of transmission has so far not been announced, but will be widely advertised by the broadcasting station, and always held at the same hour.

Wavelength, 280 metres; Call Sign, 2KY; Power, 1½ kw.

This will constitute the first series of lessons in any language to be broadcast in Australia. It is almost needless to add that reports from listeners are not only welcome but necessary.

GRAVA DEKLARO DE LA SUDSLAVA INSTRUA MINISTRO.

La Sudslava Esperantista Ligo lastatempe ricevis de kelkaj enlandaj societoj plendojn, ke multaj instruistoj kaj profesoroj diversmaniere malhelpas disvolvigon de la esperanta movado. Kelkaloke la distriktestroj kaj ĝendarmoj malpermesis eĉ fon-

don de la esperantaj societoj kaj aranĝon de la esp. kursoj. Tial la estraro de la Ligo decidis energie protesti ĉe la ministroj de l' instruado kaj internaj aferoj petante, ke ili malpermesu al siaj subuloj la similajn persekutojn. Ĉar tiutempe estadis en Zagrebo s-ro Stjepan Radić, la ministro de la instruado, la estraro decidis persone transdoni al la ministro la proteston. La 15. 3. 1926 aŭdiencis ĉe la ministro la prezidanto kaj sekretario de SEL, s-roj D-ro D. Maruzzi kaj I. Rotkvić. La ministro akceptis la delegitojn tre afable kaj donis al ili plej favorajn promesojn. La interparolo estis laŭvorte jena:

D-ro Maruzzi: Ministra Moŝio! Ni venis en la nomo de SEL por esprimi al vi — kiel al la ĉefo de la kulturministrejo — nian estimon. Sed ni devas ĉiokaze ankaŭ plendi al vi, ke multaj lernejestroj kaj profesoroj malhelpas instruadon de Esperanto.

S-ro Ministro: Kio? Tio ne estas ebla! Tio ne plu devas okazi. Mi ja mem lernis Esperanton kaj fariĝis, pri la politikaj aferoj mi ne povis ĝin finlarni. Sed tuj, kiam mi disponas pri sufiĉa tempo, mi promesas honorvorte, ke mi ĝin ellernos, ĉar mi opinias, ke estas barbareco nuntempe ne lerni Esperanton. Komence de la nova studjaro mi enkondukos Esperanton en ĉiujn komercajn lernejojn, eĉ eble, se la cirkonstancoj estos favoraj — en ĉiujn lernejojn.

(Post tiuj ĉi vortoj la ministro ordonis al sia sekretario noti, ke oni faru cirkuleron rilate al Esperanto.)

D-ro Maruzzi: Post via deklaro, Ministra Moŝto, estus ĉiu nia vorto superflua.

S-ro Ministro: Jes! Tio nur signifas verŝi akvon en la maron. Vi laboris ĝis nun: honeste, saĝe kaj persiste. Tial mi petas vin, daŭrigu sammaniere plu kaj salutu ĉiujn gesamideanojn.

D-ro Maruzzi: Ĉu vi permesas al ni, Ministra Moŝto, publikigi viajn vortojn?

S-ro Ministro: Certe vi povas! Kial ne?

Post kelkaj privataj vortoj direktitaj al D-ro Maruzzi, adiaŭis la ministro plej bonvole la reprezentantojn de SEL.

Laŭ raporto en "Konkordo," marto 1926.

El Heroldo.

JARKUNVENO EN SYDNEY.

Konforme al la A.E.A. regularo, la "Sydney Esperanto Society" okazigis la jarkunvenon je la fino de junio.

La prezidanto, s-ro Frank V. Taylor, kies loĝurbo nun estas Newcastle, sendis raporton pri la de si respondan parton de la ĵus finita financa jaro, en kiu li, i.a. diris: — Por la societo la periodo estis sukcesa laŭ Esperanta sociala kaj financa vidpunkto. Por la movado ĝenerale oni povas diri, ke la jaro alportis gravajn sukcesojn tre kuraĝigajn. — En la klubo ni klopodis interesigi la anojn pri la internaj aferoj de la societo per koncertetoj, paroladoj, prelegoj, konkursoj, dek-lamaj, muziko, teatraĵetoj kaj laŭlegado de dramoj, ktp. aldone al la ordinaraj Esperantaj kursoj.

"Rezultoj de la B.E.A. ekzameno por Esperantaj atestoj estis kontentigaj kaj montras, ke ne mankas al ni diplomitoj, kiuj povas agi kiel instruistoj aŭ ekzamenistoj kiam necesas. Ĉiu Esperantisto devus celi al la akiro de diplomo, ĉar ĝi estas definitiva mezurilo de progreso en la lingvo.

La vic-prezidanto, s-ro A. Auwart, donis sian raporton por la lastaj kvin monatoj, akcentante precipe la malfacilaĵojn spertitajn. Per tre interesa grafikaĵo li montris la malaltigon de ĉestantaro dum someraj monatoj kaj tuja kresko dum vintro.

Kiel signo de respekto la membraro levigis kaj silentis dum unu minuto pro morto de samideano, s-ro George Winter.

S-ro L. E. Pfahl sekvis kun raporto de siaj sekretariaj agadoj, denove montrante la senlacaĵajn klopodojn por diskonigi nian lingvon inter iom apartia aŭstralia popolaro.

La kasistino, f-ino V. Fairfield, prezentis la bilancojn en kiu la elspezoj preskaŭ egalas la enspezojn, restante nur kelkaj ŝilingoj kiel kreditsaldo. Por Esperantistoj tiu estas sufiĉe kontentiga.

Oni tiam elektis la nova komitato, kiu rezultis jene: — Prezidanto, s-ro F. T. Simon (unuanime); Vic-Prezidantoj, s-roj A. Auwart, kaj A. Feldmayr, kaj f-ino M. Harwood; Sekretario, s-ro L. E. Pfahl, (oka sinsekva jaro); Kasistino, f-ino V. Fairfield; Bibliotekistino, f-ino M. Cullington.

Post diskutado de diversaj (ofte tre viglaj) la kunveno fermis je la 10.30 ptm.

LA TELEFONO.

La telefonon, unu el la plej mirindaj kaj geniaj elpensoj de nia tempo, ni ŝuldas al italo Antonio Meucci, kiu pro politikaj kaŭzoj estis migrinta al New York. Li estis granda patrioto kaj amiko de Garibaldi. En 1841, dum iaj elektraj eksperimentoj li rimarkis ke la elektra fadeno reproduktadis ĉe unu ekstremaĵo, parteton de la sonaj vibradoj ricevitaj de l'alia ekstremaĵo.

Post longaj studoj li konstruis kompletan telefonaparaton dum 1856, kaj ĝin submetis al iu sinjoro Mister Grant. Tiu ĉi, ŝajnigante protekti la genion de l'ekzilito, petis modelon de l'aparato kaj tre detalan priskribon. Kaj de la aparato, kaj de la priskribo li tiel bone profitis, ke post kelkaj jaroj li patentigis la eltrovaĵon, ĝin prezentinte sub sia nomo, kaj tiu de Bell kaj de Edison!

Meucci ekvidis la trompon, sed oni ne kredis al li, ĝis kiam, dank'al la helpo de amerika miliardulo, li atingis ricevi de la juĝistaro sentencon, per kiu estas certigita lia elpenso, rekonita lia antaŭeco, kaj donita kompenso de centmil dolaroj, kiuj alvenis ĝustatempe por forigi Meucci de l'malriĉega stato en kiu li tiam vivadis.

Li mortis ne malproksime de New York en 1889.

Nuntempe estas malfermita monferado por la starigo en New York de monumento, kiu montrus la admiron kaj la rekompencon al la insultita genio de tiu granda italo.

El Corrierino esper. A. L. Reni.

—el Itala Esperanta Revuo.

La Esperanta Grupo de Touring-Club de France ĵus donacis sumon da 800 frankoj al la Internacia Scienca Asocio Esperantista, por ke ĝi estu uzata por la propagando, kiun la Asocio entreprenis en la Aeronautikaj randoj.

The Secretary, La Suda Krucio Publishing Committee.

Dear Sir,—I wish to tell you how much I appreciate the little journal and how anxious I was lest it should go out of publication. It does meet a need amongst Australian Esperantists which I think would not be met by some of the more important European journals. I look forward to its arrival every month.

With best wishes for the continued growth of La Suda Krucio.

I am, yours truly,

Dr. S. E. HUMPHREYS.
Beaufort, 26/6/26.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je ia oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo. Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.